

Maria, la fantazio de Dio

P. Alberto Maggi OSM

NOTOJ

La sigelo de la optimismo de Dio

La komenco kaj la fino de la surtera vivo de Maria, ankaŭ ne havante ajnan respondon en la evangelioj, kongruas kun la plenumo de la plano kiun Dio havas por la homaro.

Kreitaj je bildo kaj similo de Dio (Gen. 2,26), kaj vokitaj iĝi liaj filoj (Jo 1,12), la homoj realigas tiun similecon dum la tera vivo per la praktikado de amo simila al tiu de la Patro (Luk 6,35), kaj daŭrigas ĉe la Sinjoro sian ekziston transirante la sojlon de la morto (Jo 11,25-26).

La Eklezio, prezentante Maria-n kiel perfektan modelon de tiu fileca kaj simileca itinero, celebras ŝian eniron en la surteran ekziston per la *Senmakula* kaj tiun en la sferon de Dio per la *Ĉielenprenita*. Tiuj veroj, kiu eĉ ne havante ajnan referencon en la Nova Testamento apartenas al la fid-havaĵo de la kristana popolo, naskiĝis pli de la intuicio de la personoj ol de la teologia spekulado.

Per “*Senmakula*” la Eklezio celas ke tiu implikaĵo de kulpoj kiu malebligas la plenan vivkomunikadon inter Dio kaj la homaro, ne pezas sur Maria. Tiu kondiĉo ne estas stagnanta, donita unu fojon por ĉiam, male ĝi estas dinamika: la kreitaĵo estas invitata kunlabori aktive al la donaco de la Kreinto, akordigante sian amon sur la saman ondolongon de tiu de Dio, “kiu elektis nin antaŭ la fondo de la mondo, por ke ni estu sanktaj kaj senmakulaj en amo” (Ef 1,4).

Maria estas prezentita de la evangeliistoj kiel tuŝebla signo de tio kion Dio povas realigi kun ĉiu kreitaĵo kiu ne metas obstaklojn al la povo de lia amo kaj lasas sin plenigi per lia Spirito. La Senmakula estas la sigelo de la optimismo de Dio pri la homaro, la signo de kiom li estimas la homon, de kiel li bezonas ĉiun personon por finfari sian kreadon kaj esti Patro por ĉiuj homoj (2 Kor, 6,18).

Du anunĉioj

La abismo kiu dividis la homojn disde Dio estis plenigita per la *Senmakula*: la kreitaĵo povas esti intime ligita al sia Kreinto. Tiu plena komuneco, ebla por ĉiuj homoj (Ef 1,4), fruktas el kresko-procezo en la fido kiun travivis ankaŭ Maria. La fiditineron de Maria oni povas enfermi en la arko de du grandaj cikloj: la anunĉioj. Ĉiu *anunĉio* estas voko flanke de Dio al la pleneco de vivo, kaj dum la ekzisto de Maria renkonteblas du gravaj vokoj: per la unua la Dio de Izraelo sin adresas al la knabino de Nazaret, per la dua Jesuo, la “Dio kun ni” (Mt 1,23), pridemandas sian patrinon. La unua anunĉio kulminos en la naskiĝo de la Homo-Dio, la dua en tiu de la perfekta disĉiplino.

Ĉe la unua anunĉio, Dio, restinta neaŭskultita de la pastro en la Templo (Lk 1,20), sin adresas “al tio kiun la mondo malestimas” (1 Kor,1,28), al iu virino edziniĝinta en la malbonfama Nazaret (Jo 1,46), kaj petas al ŝi iĝi la patrino de sia Filo (Lk 1,26-38).

Plene fidante en sia Dio, Maria akceptas: la propono kiun la dia anoncisto faris al ŝi estas la formulado de profundaj vivbezonoj kiujn ŝi havis ene de si mem kaj kiujn nun ŝi povas liberigi kaj kreskigi.

La dua voko okazas en tre drama etoso: la tuta familia grupo decidis kapti Jesuon, nun jam konsiderata freneza (Mk3,21-35. La Galileano, kiu prezentiĝis kiel la sendito de la Sinjoro (Lk 4,18-21), sin kondukis fakte kiel malamiko de Dio, malobservante la plej sanktajn preceptojn kaj ordonojn (Mc 3,5.22; 7.15-23), kaj dum la religiaj aŭtoritatuloj lin markas kiel herezan kaj diablan blasfemanton (Mt 9,3), por la homoj li estas nur frenezulo al kiu oni ĵetu ŝtonojn (Jo 8,59).

La peto de la familianoj de Jesuo “Via patrino kaj viaj fratoj vin volas” estas interrompita per la malvarma respondo de Kristo: “Kiu estas mia patrino?...”

Laŭ Jesuo liaj intimuloj estas nur tiuj kiuj lin sekvas kaj kiel li vivadas la volon de la Patro ĝin interpretante per senkondiĉa amo kiu sin turnas al ĉiuj, sendepende de la religiaj, moralaj kaj seksaj kategorioj (Lk 10,29-37).

Maria devas elekti: aŭ si restas kun la familia grupo, kiu opinias Jesuon freneza, kaj tiel ŝi savas sian reputacion, aŭ ŝi sekvas la filon, konatan pro tio ke li estas “manĝegulo kaj drinkulo, amiko de impostistoj kaj pekuloj” (Mt 11,19).

En Nazaret la Virgulino fidis je la invito al ŝi adresita de ŝia Sinjoro kaj de tiu jeso naskiĝis la Mesio de Dio. En tiu dua anonciacio, pli suferplena kaj matura, Maria ankoraŭfoje respondas per jeso al la invito al la vivpleno kiu venas al ŝi de la Homo-Dio kaj kiu ŝin kondukos al nova naskiĝo: la ŝia.

Nun estos la patrino kiu renaskiĝos el la filo: nova naskiĝo kiu venos “de la supro” (Jo 3,3), de tiu kiu, levita surkrucen, transformos la patrino en fidelan disĉiplino (Jo 19,25-27).

Kronado de la unua anonciacio estis la beateco per kiu komenciĝas la evangelioj: “Feliĉa tiu kiu kredis en la plenumiĝo de la vortoj de la Sinjoro” (Lk 1,45); la dua anonciacio trovas sian formulon en la beateco per kiu la evangelioj finiĝas: “Feliĉaj tiuj kiuj ne vidis, kaj tamen kredas” (Jo 20,29).

La naskiĝo de la Virino

Dum la anonciacio de Nazaret kulminas en Betlehemo, kie la brilegado de la lumo de la gloro de la Sinjoro ĉirkaŭvolvas la naskiĝon de la Filo, kaj ŝafistoj kaj reĝoj estas lin adorantaj (Lk 2,1-21; Mt 2,1-12), la alia enfluas en la mallumon de Jerusalemo (Mk 15,33), kie sakroj kaj moko akompanas la morton de Kristo kaj la naskiĝon de la Virino (Mk 15,29-32; Jo 19,27).

Apud la kruco la evangeliisto ne bildigas patrino subprematan de la doloro, kiu ĉiukaze restas apud la filo ankaŭ se tiu estas krimulo, sed la kuraĝa disĉiplino kiu elektis sekvi la majstron riskante sian vivon, dum la apostoloj, kiuj ĵuris esti pretaj morti por li (Mk 14,29-31), malkuraĝe fuĝis (Mt 26,56).

Sur Golgota, pli ol patrino kiu suferas *pro* la filo, Johano montras fakte la disĉiplino kiu suferas *kun* sia Mastro, la Virino kiu partoprenas la suferon de la “Homo de la doloroj” (Is 53,3; Rm 8,17). Maria prenis sian krucon, kaj sin metis flanke de la ekzekutito kontraŭ tiuj kiuj lin krucumis, sin elmetante porĉiame flanke de la subpremitoj kaj de la malestimataj.

Ne estis facile por Maria

Por aliĝi al la krucumito ŝi metis sin kontraŭ sian familion kaj devis rompi kun la religio kiu, en la persono de sia plej alta reprezentanto, la Ĉefpastro, anatemis Jesuon (Mt 26,65; Mk 3,22). Fine, elektante la kondamniton, ŝi kuraĝis sin meti kontraŭ la civilan povon kiu ekzekutis tiun Galileanon kiel danĝeran revoluciulon (Mt 27,38). Maria apud la eŝafodo aktive konsentas kun Tiu kiu “malaltigas la potenculojn de la tronoj” (Lk 1,52): “ŝi estas flanke de la viktimoj de tiuj potenculoj kaj igas la krucon ŝia, nome ŝi akceptas, kiel Jesuo, esti konsiderata forĵetaĵo de la socio por ne malplenumi la sindevigon esti ĉeesto de la Dia amo en la mondo (Mk 8,34).

La fantazio de Dio

La ciklo malfermiĝinta per la anonciacio de Nazaret fermiĝas per la bildo de la sankta familio kunigita en amokresko kaj kun Maria kiu “konservas ĉion tion en sia koro” (Lk 2,51-52). La alia anonciacio havas sian idealan kronadon en la nova familio de Maria, la komunumo de Jerusalemo, kiu ŝi retravivas, kune kun ĉiuj kredantoj, la sperton komencitan en Nazaret: la Dio neaŭskultita en la Sanktejo, daŭre elverŝas sian vivon, la Spiriton, al la flankenmetitoj de la Templo, al la komunumo de la herezaj Galileanoj (Ag 1,14; 2,1ss).

Fine Maria “prenita” al la ĉielo estas la subskribo de Dio sur la plano “homo”, homo kiu lasas sin kuntreni de la viviga agado de la sankta Spirito. Tiu glorado estas la destino de tiuj kiujn Kristo igis fratoj, ĉar, kiel skribas Paŭlo, tiuj kiuj sekvas la Sinjoron “sidas en la ĉieloj, en Jesuo Kristo” (Ef 2,6), estas kiel li venkintoj de la morto kaj daŭrigas vivi porĉiame (Jo 11,25).

Por Maria la ĉielenprezo estas la mormala konkludo de iu eksterordinara vivo: ekde Nazaret ŝi ĉiam direktiĝis al vivelektoj, fidis je la fantazio de tiu Dio kiu transformas ĉiujn aferojn en bonon (Rm 8,28), kaj agas tiel ke tiuj kiuj ŝajnas ŝtonoj, estu male pano (Mt7,9); Dio kiu elektas tion kio en la mondo estas malestimata por ĝin igi objekto de sia amo (1 Kor 1,27-30), kaj agas tiel ke anonima junulino el fora vilaĝo estu “nomata feliĉa de ĉiuj generacioj” (Lk 1,48).